

# Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

## TIEL OKAZIS

### ŜANĜO DE LA PREZIDANTO

*La Jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo (JER)*

\*la 26-a de januaro en Tikyuu-simin-plaza

Kiel la plej supera decid-organo de nia rondo, ni resumis la jaran buĝeton kaj la raporton, kaj fiksis tiujn por 2014. El la stabanoj, la prezidanteco iris de s-ro DOI Hirokaz al s-ro SIBAYAMA Zyun'iti. La membroj de la Plenumkomitato restas senŝanĝa, kun s-ino MIYAZAKI Hideko kiel la Direktoro.

Nun nia rondo ne havas juran personecon. S-ro DOI pledis, ke ni akiru statuson de la "Registrita Ne-Profitcela Organizo" laŭ japana juro, por altigi la statuson de la rondo al la publiko. La ideo estis aprobita, kaj ni celas fariĝi tia en aprilo 2015.



(La Plenumkomitato)

★ S-ino DOI Ĉieko

★ S-ro DOI Hirokaz

(taskita por la jura personigo de la Rondo)

★ S-ino MIYAZAKI Hideko (la direktoro)

★ S-ro NANBA Fumiharu

★ S-ro SIBAYAMA Zyun'iti [ŝibajama ĝun'iĉi]

(la prezidanto)

★ S-ino Torii Fusako

## INFORMO

\*La japana ĉefdelegito de UEA

S-ro DOI Hirokaz, nia rondano, fariĝis la ĉefdelegito en Japanio, de tiu ĉi januaro, sekvate de s-ro HARADA Hideki el Okayama. La deĵorado daŭros 3 jarojn.

## NIAJ PLANOJ

### ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

\*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; oni lernas jen legante artikolojn, jen verkante, jan tradukante / (2) Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / (3) Jokohama Salono / (4) Daŭriga kurso

\*Regula Klaso en merkredo. Oni finlegis "Punkuino", kaj legos "Barbro kaj Eriko".

\*Daŭriga Klaso en ĵaŭda vespero.

### EN "INTERNACIA FORUMO" DE JOKOHAMO

\*la 9-a de februaro, 12h00-12h50, en la domo de JICA

Ni partoprenos en prelegaron, kiun organizos komitato de la rondoj aktivaj pri internaciaj agadoj en nia urbo, kaj tie prezentos Esperanton kaj nian rondon japane al la publiko. La titolo de la prelego estas "Kunvivado de multaj kulturoj kaj Esperanto", farota de Sibayama Zyun'iti.

### FOIRO DE LA CIVITANAJ AGADOJ

\*la 8-a kaj 9-a de marto, 10h00-15h00, ĉe la regula kunveno

Multaj rondoj, kiuj uzas la regulan kunvenejon, kiu estas la gubernia posedaĵo por civitanaj agadoj, ekspozicios sian agadon. Kadre de ĝi, ni havos regulan lernokunsidon, akceptante eventualajn gastojn.

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti  
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458  
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>  
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

---

---

**ESEJOJ**

---

---

Baldaŭ, la 11an de marto 2014, ni japanoj frontas 3-an datrevenon de la katastrofo de cunamo en la Nord-Orienta parto de Japanio. Ni publikigas 2 eseojn pri tio.

### Unika Kunlabora Koncerto de *Aŝinaga-Ikueikai*

TANIGAWA Hiroshi

Ĉi-jare en marto venos la tria datreveno de la Katastrofa Tertremo kaj Cunamo en Nord-Orienta Japanio. Memore al la Katastrofo, *Aŝinaga-Ikueikai*<sup>(\*)</sup>, Ne-Profita Organizo por helpi orfojn pro la Katastrofo, kiuj perdis sian patron aŭ patrinon, aŭ eĉ gepatrojn, okazigos unikan koncerton, surbaze de internacia kunlaboro, en la urbo Sendai, kaj en Tokio.

La organizo *Aŝinaga* donis monan helpon al pli ol 2 mil orfoj de la Katastrofo. Kaj ĝi nun konstruas zorgo-domojn por la orfoj de la Katastrofo tri-loke en Tohoku-Distrikto, nome en Sendai, Iŝinomaki kaj Rikuzen-Takata.

*Aŝinaga* helpis ankaŭ la orfojn en Ugando en Afriko.. Oni konstruis en 2001, privatan lernejon nomatan *Tera-koja* kaj helpis la orfojn per eduko.

La unika internacia kunlabora koncerto konsistos el jenaj grupoj ludantaj.

(1) Afrikaj muziko kaj danco, de ugandaj georfoj.

(2) Koruso de la Universitato Vassar, Novjorko

(3) Japanaj tamburoj, de la orfoj de Nord-Orienta Distrikto

La koncerto okazos en la 13a de marto, 18:00- ĉe la Memorhalo de la Tohoku-Universitato (en Sendai)

en la 20a de marto, 18:00- ĉe *Ŝinjuku-Bunka-Sentaa* (en Tokio)

Enir-bileto estas senpaga, sed oni atendas ĉe la enirejo monoferon por *Aŝinaga-ikueikai*.

(\*) Laŭdire: Organizo por Stipendio Longkrurula. La nomo devenas de la anglalingva novelo Paĉjo-Longkrurulo (*Daddy Longlegs*), anonima helpanto al orfo.

### Vizito al la urboj atakitaj de la granda cunamo (1)

KOYAMA Takesi

Meze de la lasta decembro (2013) mi vizitis kelkajn urbojn atakitajn de la granda cunamo en la 11a de marto 2011. En la urboj, grandaj rubaĵoj jam ordiĝis, sed la novaj konstruaĵoj ankoraŭ ne komencis ekkonstruon. Mi havis kelkajn impresojn.

#### (1) La Urbo Taroo

La urbo Taroo havis la plej grandan kontraŭtajdan digon ĉe marbordo por defendi la urbon. Onidire ĝi estas Granda Muro, ĉar la digo estis 10 metrojn alta kaj sume 2 433 metrojn longa. Sed la cunamo detruis eĉ la fierindan grandan digon kaj malaperigis multe da konstruaĵoj.

Mi promenadis en la sendomaj kvartaloj, kie restis nur betonaj fundamentoj de domo. Oni preskaŭ jam ordigis grandajn rubaĵojn, sed ili ankoraŭ estis kvazaŭ velkinta herbaĉa ebenaĵo kun terbuloj kaj ŝtonetoj.

Mi serĉadis memoraĵon sed nenion mi trovis. Oni diris, ke en la kvartalo de marbordo la prezo por 1 *cubo* (ĉ.3.3 centiaroj) estis ĉ. 300 mil enoj, kaj en la altaĵo la prezo por 1 *cubo* estis 8 mil enoj. Ĉu vere? Kiam mi rigardis nigre kuŝantan parton de la granda digo en la direkto al marbordo, kaj kiam mi rigardis sendifektajn brilantajn domojn ĉe la altaĵo en kontraŭa direkto, mi rememoris ke tro komforta vivo, ne daŭras longe.

#### (2) La Urbo Oocuĉi

La cunamo donis tre grandan damaĝon al la urbo Oocuĉi. La urbestro kaj kelkdek oficistoj viktimiĝis en la granda cunamo. Lastatempe oni fine decidis konservi ĝin kiel monumento. Antaŭ la urbodomo malgranda altaro troviĝis kaj kelkaj floroj estis oferitaj. Sur la fronta muro de la urbodomo kun forĵetita fenestro estis metita la haltinta murhorloĝo, kies montrilo estis je la

5a kaj 18 minutoj. Ĉirkaŭ la urbodomo rubaĵoj estis ordigitaj, sed la interno de la ĉambroj tute ne ordiĝis. Disfalintaj muroj, implikite falintaj dratoj kaj rubaĵoj estis lasitaj en ĉambroj. En malgranda ĉambro amasiĝis multe da polvo kaj en malgranda ŝranko troviĝis multaj tetasoj.

En la urbo, ordigi grandajn rubaĵojn estis kvazaŭ en vasta herbejo kun malgrandaj rubaĵoj, ŝtonetoj kaj terbuloj. Mi paŝis al la duone defalinta digo evitante flaketojn.

La kontraŭtarda digo estis disfalintaj aŭ detruitaj aŭ sinkitaj po bloko, sed la kluzo estis tute neskuebla kaj impona. Fuŝaĵo de dig-konstrulaboro estis atestita klare, mi pensis.

Kiam mi paŝis sur malseka herbejo, mi vidis salmon ĉirkaŭ 50 centimetrojn longa en malprofunda flako apud rivereto. Ĝi apenaŭ naĝis elmetante duone dorson. Ankaŭ en kota rivereto alia salmo naĝis montrante dorson. Kial la salmo perdis sian vojon?

Ankaŭ la stacidomo, reloj tute malaperis. Kiam la Fervoja Kompanio (JR) rekonstros la detruitan fervoj-linion Jamada?

**(3) Antaŭuloj admonis, sed posteuloj forgesis ĝin**

La sekvantan tagon, la loka gvidantino klarigis pri terura cunamo antaŭ monumento apud malnova lernejo. Ŝi diris, ke ĉi tiu marborda vilaĝo ĉiam havis cunamon. Tial antaŭuloj restis gravan lecionon, sed junaj posteuloj facilege forgesis ĝin. Pro tio ĉi-foje oni devis ricevi grandan damaĝon. Kaj ŝi montris cunaman monumenton starigitan en antaŭ 80 jaroj (1933) jene:

1-Kiam tertremo venis, atentu cunamon.

2-Kiam cunamo venis, iru alten.

3-Ne loĝu en danĝera loko.


Ŝi loĝas sur la altaĵo, en kiu ŝia patro tiam konstruis la domon. (daŭrigota)

## Esperantaj lecionoj en la mezlernejo de Niŝiŝiba

En 2013 ni havis Esperantajn lecionojn de la mezlernejo de Niŝiŝiba en la kvartalo Kanazaŭa, Jokohamo. Tiam ni havis tri gelernantojn 15-jarajn. Kiel vi vidas sur la foto, du knaboj estas tre altaj, pli ol 180 centimetrojn altaj, kaj unu knabino estas malalta kiel mi. Tamen tio ne gravas. Ili diligente lernis nian lingvon, 90 minutojn en unu fojo, sume 9 fojojn jare. En la fino, en la lerneja festivalo oktobre ili prezentis sin Esperante, kaj preskaŭ parkere rakontis pri "Suno kaj Vento", montrante bildojn memdesegnitajn sur ekrano, kun diversaj sonoj faritaj de unu knabo per komputilo. Ili povis montri tion al ĉiuj en la lernejo.

La Esperanta leciono en la mezlernejo komenciĝis en 2003 sub la iniciato de la siatempa lernejestro, kunlabore de lokaj aktivaj homoj. Tio daŭras do pli ol 10 jarojn. Estas diversaj kursoj: krom Esperanto, japana ŝako, goludo, kuirado, kaligrafio, ukulelo,

kotoo, anglalingva konversacio, infanvartado, japana danco, floraranĝo, te-ceremonio ktp. Dum la 11 jaroj mi povis okazigi Esperantajn lecionojn 8-foje. Ĝis 2012 mi sola gvidis, sed lastjare (2013) helpis ankaŭ mia edzo Hirokaz. Ni esperas, ke ni povos havi Esperantan lecionon ankaŭ ĉi-jare. (Doi Ĉieko)





## Utaoj de Wakayama Bokusui

(若山牧水の短歌より)

Aida Yayoi

幾山河越えさり行かば  
寂しさの終てなむ国ぞ  
今日も旅ゆく

Kiom da montoj kaj riveroj mi devas trapasi  
por atingi sensolecan regionon?  
mia vojaĝo daŭras plue ankaŭ hodiaŭ

白鳥は哀しからずや  
空の青海のあをにも  
染まずただよう

Ĉu cigno ne estas trista?  
ĝi ŝvebas netinkturite de la blua ĉielo  
nek de la blua maro

うすべにに葉はいちはやく  
萌えいでて咲かむとすなり  
山桜花

Ekĝermis jam folioj helruĝe  
venos la tempo admiri  
sakurflorojn tutmonte

山ねむる山のふもとに  
海ねむるかなしき春の  
国を旅ゆく

Montoj dormas, piede dormas la maro  
vagante sola mi envenis  
la regionon printempan

白玉の齒にしみとほる  
秋の夜の酒はしづかに  
飲むべかりけり

Inter dentoj penetras blankaj rizbuloj  
friskan nokton aŭtunan  
oni ĝuu kviete kun sakeo

雲ふたつ合はむとしては  
また遠く分れて消えぬ  
春の青ぞら

Du nuboj kuniĝontaj  
dividiĝis denove kaj malaperis foren  
restas la blua ĉielo printempa

(Noto) Wakayama Bokusui (若山牧水, 1885-1928) estas utaisto, nome literaturisto specialiĝinta je utao, verso kun 5,7,5,7,7 silaboj en la japana lingvo.



### Korekto

de la n-ro 289 (jan.):

En paĝo 1, pri Zamenhof-Festo en Kawasaki, estis erare skribite, ke s-ino Aleksandra Watanuki gvidis konversacion. Vere, ŝi estis en poem-traduka grupo, kaj Stephan estis en la konversacio.

**Redaktanto  
salutas**



La redaktanto SZ, fariĝis samtempe la prezidanto de Jokohama Esperanto-Rondo. Bonan subtenon mi petas!